


la Espero

1989:6

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN

RIĈA LIBRO- RIKOLTO



Redaktoro:

En tiu ĉi numero vi trovos buntan kolekton da diversaj artikoloj. Mi ankoraŭ serĉas kunlaborantojn por la rubrikoj *Por komencantoj* kaj *Ciutaga esperanto*. Kiu pretas kunlabori? Memoru ke artikoloj por komencantoj ne devas esti porinfanaj, sed facillingvaj, do verku pri iu ajn temo.

Ekzistas multaj eblecoj subteni esperanton. Unu estas ke vi aŭ via firmao anoncas en *La Espero*. La tarifojn vi trovos sur paĝo XX.

Trege grava artikolo en tiu ĉi numero estas 'Ĉu ni estas sur la ĝusta vojo?' Mi tute samopinias kun la verkinto, ke la plej grava afero estas ne perdi ekstudintojn. Varbi ankoraŭ novajn estas malfacila kaj malpli grava afero. Legu kaj reagu!

Leif Nordenstorm

La Espero korektas

Pri landnomoj en *La Espero* nro 5/89:

La protestoj de la novzelandaj esperantistoj estis pro miskompreno de la decido de la akademio. Zelando estas nur la radiko. Laŭ la akademio la nomo de la lando ja estas Novzelando.

Leif Nordenstorm

DONACOJ

Glaes Göran Ingestedt,
Vällingby 200.
Adolf Vestman, Björna 175.
Mary Asplund, Härnösand 875.
Harry Victorin, Arboga 100.
Erik Hellstrand, Trosa 25.
Claes Göran Ingestedt,
Vällingby 100.
A. Bernhard, Alvesta 50.
Margareta H. 200.

*SEF kore dankas pro la donacoj.
Novaj tiaj estas bonvenaj al
SEF, poŝtgiro 20 12-3.*

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 95156 Luleå,
tel. 0920-279 78

Sättning: Per Aarne Fritzson och Leif Nordenstorm

Utformning: Franko Luin/Omnibus

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1989

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag
kl 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1990: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem
(utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantist-
ers Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får
den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga,
tel. 0589-155 31 (Nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings
Kärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-12205 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby,
tel. 0491-20461 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby,
tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-16 26 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzson, Möregatan 9, II, 116 27 Stockholm,
tel. 08 - 408892

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå,
tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson.

Enhavo

- 84 Kristnasko kaj ĝiaj tradicioj
86 De kie venas la afrikaj landnomoj
87 Poezio: La lakta vojo
88 Ĉu ni estas sur la ĝusta vojo?
90 "Bubalo" aŭ "bizono" - eraro de l' monato
91 Tri, kies mankon ni jam sentas
92 Unu sveda informkajero kaj fasko da ĉinaj libroj
93 Kalendaro
94 TRA LA MONDO:
Esperantocentrum i Bialystok
Amnesty använder esperanto
Asocio por turistoj
Iom pri la kongreso en Havano
94 Nisikawa el Takatuki
95 TRA LA LANDO:
Ĉu esperanta teamo en Vätternrundan?
Skolta agado
Seminarium i Karskoga
Kvindek partoprenis en Skövde
Gasto el Tallinn
Pola aktorino turneis
Karlskoga popola altlernejo
96 SEJU:
Novaj datoj de IJK
Sukcesa aranĝo en Östansjö
Kvinpinta Semajno
Por infanoj kaj gejunuloj
ĝis 18

Prezidanto:

Kion ni atingis en 1988?

Nun vi havas la lastan numeron de La Espero en viaj manoj - por tiu ĉi jaro. Estas nekredeble ke ankoraŭ jaro pasis. Konsolo estas ke ni atingis almenaŭ kelkajn partocelojn dum la baldaŭ pasinta jaro. Sed samtempe mi miras, ke ni ne atingis ankoraŭ pli. Kiam ni aŭdas pri la multaj lingvaj obstakloj inter homoj, estas nekomprenoble, ke ili ne akceptas esperanton pli rapide. Inter ĉiuj kampoj en nia socio, kiu pli kaj pli internaciigas, oni havas lingvajn malfacilaĵojn - inter la politikistoj, sindikatoj sportistoj, turistoj, inter la multaj internaciaj asocioj... Urgas prezenti esperanton grand-skale - ĉar pli kaj pli oni akceptas kaj alkutimiĝas al la multlingveco.
Kion ni do atingis dum 1989?

Nordia komisiono

Ni starigis Nordian komisionon, celante al komuna informado inter internaciaj organizaĵoj kaj aliaj por ni interesaj grupoj. En januaro ni denove renkontiĝos sumante la rezulton. Ivo Durwael, novelektita estrarano en UEA, respondeculo de informado, diris en letero al la komitatanoj de UEA: 'Niaj eblecoj por atingi eĥon estus multe pli grandaj, se la samaj aktivuloj kun la sama energio sukcesus harmoniigi la agadon. Ni provu trarompi la izolatecon de multaj aktivuloj por atingi efikan kunlaboron.' Ĝuste tio estas nia celo en la Nordia Komisiono.

Edukradio

Ni ankaŭ establis pli firman kontakton kun Utbildningsradion (La edukradio), kaj kvankam ni ankoraŭ ne ricevis certan jeson, Bengt Horneij, la estro, estas optimisma pri serio da informprogramoj pri esperanto en 1991. Li diris ke 'la muelilo de la edukradio muelas malrapide', sed li aldonis ke li estas varma subtenanto de esperanto. Mi parolas kun li almenaŭ unufoje, monate, kontrolante ke li vere laboras pri tiu serio.

Landaj agadoj

Aliaj menciindaj progresoj estas la kursoj en la Popola Altlernejo en Karlskoga, la multaj tre altetakisitaj kursoj aranĝitaj de la regionoj kaj kluboj. La turneoj de vere kompetentaj prelegantoj tra la lando estas ege bona informilo por esperanto al la lernejoj kaj al la ĝenerala publiko kaj donas eĥon en la gazetaro. Dum la jaro ni raportis pri la laboro farita en la kluboj en nia membra gazeto.

EsperantoCentro

Laste mi volas informi vin ke en EsperantoCentro nun laboras Per-Aarne Fritzon dum 2-3 horoj semajne. Per-Aarne estas kapabla esperantisto kaj li antaŭ kelkaj jaroj laboris en EC. Nun li okupiĝas pri kvalitaj taskoj en nia oficejo. La honorarion, kiun SEF pagas por la laboro, Per-Aarne donacas al la junulara agado. Tiu solvo helpas la estraranojn pli multe dediĉi sin al ekstera informado kaj agado.

Ĉu ni povas esti kontentaj pri la laboro farita dum la baldaŭ pasinta 1989?

Mi esperas ke vi ĝuu vian kristnaskan libertempon, eble kun bona esperantolibro, kaj mi deziras al vi prosperan 1990.

Karin Lindquist

Kristnasko kaj ĝiaj tradicioj

Kristnasko (jul) estas antikva festo en ĉiuj kristanaj landoj. Ĝi tamen havas du radikojn, unu paganan kaj unu kristanan.

En multaj kulturoj oni jam en antikva tempo havis somermezan kaj vintromezan festojn. La antikva pagana festo en Nordeŭropo eĉ havas propran nomon en esperanto: *julo* (fornordisk jul). Tiun vorton oni ne uzu kiam ni parolas pri la nuntempo, sed nur en libroj pri vikingoj kaj simile.

La eklezio elektis la romian vintromezan feston por festi (fira) la naskiĝon de Jesuo. Tio ne signifas ke Jesuo naskiĝis en la Kristnasko. Tio estas pli posta miskompreno.

En Svedio la festo komenciĝas jam en la *antaŭvespero de Kristnasko* aŭ *Kristnaska vespero* (julafton). (Por kelkaj svedoj Kristnasko fakte komenciĝas jam en novembro, kiam ili fariĝas nervozaj pro ĉiuj preparoj.) En aliaj landoj la *Kristnaskaj festotagoj* (julhelgen) komenciĝas kun la *Kristnaska tago*, aŭ pli simple *Kristnasko* (juldagen). Post ĝi venas la *tago de Sankta Stefano* (annandag jul, den helige Stefanos dag), kiu estas memortago de martiro. Pli poste venas la *novjara (antaŭ)vespero* (nyårsafton) kaj la *novjara tago* (nyårsdagen). *Epifanio* (trettondedagen) estas kristana festo de la tri reĝoj.

Advento (advent) estas prepar-tempo dum kvar semajnoj antaŭ Kristnasko. Laŭ malnova tradicio oni fastu dum tiu ĉi tempo. Tiu tradicio ŝajnas al mi bona, ĉar ordinare ni tro multe manĝas dum Kristnasko.

La 13an de decembro okazas la *Lucia festo* en Svedio kaj Sicilio. Sankta Lucia estis sanktulino, kiu mortis en la jaro 304. En Svedio infanoj aŭ gejunuloj tiun ĉi tagon kantas tradiciajn luciajn kantojn. Unu el la knabinoj estas elektita Lucia kaj portas kandelkronon kaj

blankajn vestaĵojn. Ŝin sekvas kantantaj *junulinoj* (tärnor). *Steluloj* (stjärngossar), knaboj kun blankaj vestaĵoj kaj konusa paperĉapo kun steloj kantas pri Sankta Stefano. Ili



fakte apartenas al la tago de Sankta Stefano, sed nuntempe ofte akompanas Lucian.

Kristnaskaj tradicioj

La infanoj en Nordio (Norden) entuziasme atendas ke la *Kristnaska koboldo* (jultomten) alportos al ili *kristnaskajn donacojn* (julklappar). En aliaj landoj la infanoj atendas la samaspektan Sanktan Nikolaon. Sankta Nikolao iam estis episkopo en Azio kaj fariĝis *patrono* (skyddshelgon) de la infanoj. Kiam ni nordianoj anstataŭigis nian tradician *kristnaskan virkapron* (julbock) per li, ni elektis novan nomon el nia *superstiĉaro* (folkstro).

Gravaj por ni svedoj estas la kristnaskaj manĝaĵoj. Kutimaj estas *Kristnaska ŝinko* (julskinka), *lesiva gado* (lutfisk) kaj *riza kaĉo* (risgrynsgröt). Post la manĝo ni volonte trinkas *spicvinon* (glögg).

Relative nova tradicio estas la *kristnaska arbo* (julgran), kiu alvenis el Germanio antaŭ cent jaroj. Nun ĝi tamen estas tre ofta en nia lando.

Annonsera i La Espero

Annonsera i La Espero enligte följande villkor:

Helsida	2 400 kr
Halvsida	1 450 kr
Fjärdedelssida	850 kr
2 spalter x 6 cm	500 kr

På ovanstående priser får esperantoklubbar och medlemmar 50 % rabatt.

En nyhet för 1990 är småannonser. Tio kronor per rad. Lägsta kostnad dock 50 kr. Högst tio rader per person och tidskriftsnummer. Annonser beställes hos redaktören.

La Espero en 1990

La eldondatoj por *La Espero* dum 1990 estos proksimume:

	<i>Limdato por materialo</i>	<i>Aperdato</i>
N-ro 1	19-a de januaro	28-a de februaro
N-ro 2	16-a de februaro	28-a de marto
N-ro 3	1-a de junio	11-a de julio
N-ro 4	17-a de aŭgusto	26-a de septembro
N-ro 5	14-a de septembro	24-a de oktobro
N-ro 6	19-a de oktobro	28-a de novembro

Universala Esperanto-Asocio arbetar för tre mål

• att sprida esperanto

Med sina landsförbund i närmare 50 länder arbetar UEA för att sprida esperanto, både genom kontakter med internationella organisationer och genom att sprida intresse för språket bland enskilda.

• att använda esperanto

UEA hjälper alla esperantotalande att ha nytta av sina kunskaper. Främst genom *Jarlibro*, årsboken som innehåller över 2000 adresser på delegater och esperantoorganisationer över världen. UEA ger också ut en bokkatalog med fler än 3000 böcker på esperanto.

Tidskriften *Esperanto* är ett måste för den som vill ha ut så mycket som möjligt av språket. *Kontakto* innehåller texter i olika svårighetsgrader, lämpliga för er som lär er esperanto.

• att öka medvetandet om internationellt samarbete

I UEA:s tidskrifter behandlas regelbundet internationellt samarbete inom FN, UNESCO och på annat håll.

UEA arbetar också för att stödja esperantorörelsen i Tredje världen. Canuto-insamlingen betalar medlemsavgifter. Afriko- och Azio- stöder information och undervisning och Tria-Mondo-insamlingen bjuder in esperantister från u-länder till kongresser.

Som direkt medlem i UEA ger du världsförbundet ett extra stöd, samtidigt som du själv får en del förmåner, t ex nedsatt kongressavgift för kategorierna MJ, MA och DM. UEA arbetar nu för att komma upp i 8000 direkta medlemmar 1990, 9000 1991 och 10 000 1992. Vi svenskar har råd att bli med.

Här är avgifterna för 1990:

MA	medlem med årsbok och tidskriften <i>Esperanto</i>	250 kr
MJ	medlem med årsbok (ungefär 400 sidor)	100 kr
MG	medlem med den 128-sidiga informationsskriften <i>Gvidlibro</i> (Ger ej rabatt vid anmälan till Universala Kongreso)	40 kr
SZ	Societo Zamenhof, för den som vill ge UEA ett extra ekonomiskt stöd (Medlemskap ingår ej.)	500 kr
PT	Patrono de TEJO, stöd till ungdomsförbundet TEJO, <i>Kontakto</i> och andra TEJO-trycksaker ingår. (Medlemskap ingår ej)	300 kr
DM	livstids medlemskap med livstids prenumeration på årsboken och <i>Esperanto</i>	6250 kr

Den som ännu inte fyllt 30 år 1 januari 1990 och blir medlem i någon av kategorierna MJ, MA eller DM får även *Kontakto*. Ange födelsedatum.

Avgiften kan betalas in på postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser. Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby. Tel. 0415-501 52.

De kie venas la afrikaj landnomoj

En La Espero 1989.5 vi povis legi la decidojn pri landnomoj de la Akademio de Esperanto. Eble vi ŝatus scii de kie venas la nomoj de la landoj. Ni komecu esplori la afrikajn.

Estas tute nature ke oni ne povas formi afrikajn landnomojn en la maniero, kiel oni formas la Eŭropajn, per kun-meto de la nomo de popolano kun -io, kiel svedo/Svedio.

En multaj Afrikaj landoj loĝas ĝis cent diversaj popoloj. Tial afrikanoj vere devas uzi sian fantazion por krei alispecajn landnomojn.

Du landoj ricevis nomojn laŭ sia loko en Afriko: Sud-Afrika Respubliko kaj Centr-Afrika Respubliko. Aliaj havas nomojn laŭ la regiono, kie ili troviĝas: Sudano, Gvineo, Ekvatora-Gvineo kaj Gvineo-Bisaŭo. La lasta enhavas la nomon de sia ĉefurbo.

Kelkaj landoj nomiĝas laŭ malnovaj landoj, kiuj ekzistis antaŭ kelk-cent jaroj: Benino, Malio kaj Gano. La nunaj Benino kaj Gano tamen ne estas en la samaj lokoj, kie estis la malnovaj! La nomo Zimbabvo devenas de ruina urbo en la lando.

La naturo donis al Afrikaj landoj multajn nomojn. Gambio, Zairo, Kongolo, Niĝero kaj Niĝerio ricevis siajn nomojn de la nomoj de riveroj. Zairo kaj Kongolo troviĝas sur ambaŭ flankoj de la sama rivero kaj prenis ĝian nomon el malsamaj lingvoj. La rivero Niĝero donis sian nomojn kaj al Niĝero kaj al Niĝerio. Kamerunio ricevis sian nomon laŭ la portugala nomo de rivero, *Rio dos Camarões*, "la rivero de la kraboj". Ankaŭ monto en la lando havas similan nomon. Cadio kaj Malavio formis siajn nomojn laŭ lagonomoj. Tanzanio estas interesa nomo. La lando kuŝas inter la lago Tanganjiko kaj la insulo Zanzibaro. La land-

nomo estas kunigo de la du ekslandoj Tanganjiko kaj Zanzibaro. Kenjo havas sian nomon laŭ la samnoma monto. Dezertoj donis nomojn al Okcidenta Saharo kaj Libio.


Fine kelkaj landoj, simile al multaj Eŭropaj havas nomojn laŭ popolo, kiu loĝas en ĝi: Somalio, Ugando, Burundo, Ruando, Bocvano, Lesoto kaj Svaŭzlando.

La plej interesaj ekzemploj an-

koraŭ restas. Ebura Bordo aŭ pli simple Eburio ricevis sian nomon laŭ produkto, eburo, la dentegoj de la elefantoj. Liberio tiel nomiĝas pro libereco! Al la lando translokiĝis liberigitaj sklavoj de Usono.

Kiu ŝatus skribi similan artikolon pri eŭropaj landnomoj. Tio tute certe estas malpli facila afero. Kiu el vi ekzemple scias kion signifas Svedio?

Leif Nordenstorm



Jen mapo pri Afriko, kie ĉiuj nomoj de landoj kaj urboj estas intence forlasitaj. Provu, per helpo de la listoj en la antaŭa numero de La Espero, enskribi kiom eble plej multe da nomoj.

La lakta vojo

Silentas nun la nokt', kaj estingita jam la lamp',
ekstaras nun memoroj el antikva praa temp',
legendoj mildaj inter-svarmas, strioj en la for',
dum mira kaj melankolia estas nia kor'.

La brilaj steloj benas nin en vintronokta bril',
kun rido, jes, kiel sur ter', ne estus mort-steril'.
Ĉu stelan lingvon konas vi? Rakont' de longe for!
Ĉi legendon, se, vi aŭdus, ĝojegus via kor'.

Sur stelo fora loĝis li en stel-ĉiela pomp';
ŝi loĝis sur alia stel', nenia voj' sen romp'.
Kaj Solomi kaj Zulamith, nomoj de la du',
kaj amis ambaŭ tiel alte alian la unu'.

Loĝis ili jam sur la ter', en viv' da ĝoj' kaj am',
disigis ilin nokt' kaj mort' kaj pek', malĝoj', malam'.
Flugiloj blankaj sur ili kreskis en paca mort'
sed pune, fore for, du steloj nun ilia sort',

Sed sur l' alian pensoj en la hejm' en alta blu'.
Senlima estis spac' da steloj inter tiuj du;
sen-nombraj mondoj, grand-mirakloj el kreinta man'
sin sternis inter Solomi kaj Zulamith en am'.

Kaj tiam Zulamith dum nokt' en fora stelo-rond'
konstrui jam komencis ponton el lum' de mond'
al mond';
kaj tiam Solomi, kaj ŝi, el lim' de sia stel'
komencis ponton krei ŝi, jes, kun la sama cel'.

Mil jarojn ili penis kun pli supera kred' ol mont',
kaj ekestis La Lakta Voj', la luma stelar-pont',
en-brakum-iĝis eĉ plej fora zodiaka an',
ĉiuj kuniĝis bord' al bord' trans spaca ocean'.

Timegis la keruboj, jen al Di, demand' kaj ĉu:
'De Solomi kaj Zulamith ĉu pravas ĉi konstru'?'
Ridetis nur Potenca Di', jen granda lum' el li:
'Se am' konstruis mia-monde, ne detruas mi!'

Kaj Solomi kaj Zulamith, post kiam pretis pont',
sin ĉirkaŭbrakumis, kiel nun diras la rakont'.

Plej brila stel' en alt' pri tio estas poste-sign';
malĝoj' miljara, tre amara iĝis nur benign'.

Kaj ĉio sur la ter' aminta kun tenera kor',
pro pek', malĝoj', turment' kaj mort', pelita longe for,
se havas ĝi potencon nur, de mond' al mond' helpil',
certigu vi pri venk' de l' am', pri la sopir-trankvil'.

Zacharias Topelius (1818-1898)
Elsvedigis: Gustav Stenholm

Zacharias Topelius estis svedlingva, finnlanda verk-
isto, alt-romantika kaj nacia, siatempe post Johan
Ludvig Runeberg la plej konata en Finnlando dum
la 19-a jarcento.

EBBE VILBORG

**ETIMOLOGIA
VORTARO DE
ESPERANTO**

VOLUMO 1: A - D

Nun havebla!

Unua volumo de verko, kiu klarigas de
kie devenas la esperantaj vortoj. Absolute
nepre por ĉiuj, kiuj serioze interesiĝas
pri esperanto.

Granda formato (240x170 mm), 104
paĝoj. Pliaj volumoj survojas.

Prezo: **80 kronoj**, kio inkluzivas
varimposton kaj sendkostojn.

**ESTU INTER LA UNUAJ!
MENDU JAM HODIAŬ!**

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
BOX 7520, 200 42 MALMÖ, PG 578-5

Ĉu ni estas sur la ĝusta vojo?

La celo de la Esperantomovado estas disvastigi la Internacian Lingvon. Tio estas klara. Disvastigi Esperanton signifas kreskigi la nombron de esperantistoj en la mondo. Ankaŭ tio estas klara. Sed ĉu estas klare, kiu vojo estas la plej efika por atingi tion? Per tiu ĉi artikolo mi volas instigi al debato pri niaj bazaj metodoj.

La ĉiama taktiko de nia movado konsistas el informado, propagando, argumentado ktp al la ne-esperantista publiko. Ni esperas iam trarompi la obstinajn barojn. Ni volas komprenigi al la homoj, ke internacia lingvo estas ebla kaj bezonata, ke Esperanto estas taŭga ilo por tutmonda komunikado, ke la naciaj lingvoj ne povas bone plenumi tiajn taskojn, ktp. Ĉu ni sukcesas? Ĉu la nombro de esperantistoj estas kreskanta? Eble, sed certe ne sufiĉe.

Lastatempe mi komencis dubi, ĉu nia taktiko estas taŭga. Ĉu ne alia taktiko ol informado eksteren estas bezonata?

Ĉiujare amasoj da homoj komencas studi Esperanton, sed sufiĉe malmultaj el ili fariĝas esperantistoj, kaj el tiuj, kiuj ja esperantistiĝas, sufiĉe malmultaj restas. Multaj forlasas la lingvon. Estas malfacile eldiri procentaĵon, sed mi supozas, ke el ĉiuj, kiuj komencas pri nia lingvo, maksimume 5% restas esperantistoj.

Kiom el tiuj, kiuj komencas, fariĝas tion pro nia organizita propagando? Mi pensas, ke sufiĉe malmultaj. Plej multaj komencas, ĉar ili legis pri la lingvo en iu enciklopedio, vidis iun lernolibron, aŭ havas iun amikon, kiu estas esperantisto. Tio signifas, ke eĉ malpli ol la supozataj 5% estas fruktoj de niaj aleksteraj informstreboj. Ĉu fakte iu el vi konas eĉ unu esperantiston, kiu estinte negativa al nia lingvo, poste pro argumentado ŝanĝis sian opinion kaj

fariĝis esperantisto? Pripensante kiel magraj estas la fruktoj de nia propagando, oni povas facile ekdubi, ĉu entute indas informadi.

La fakto, ke tiel malmultaj restas esperantistoj, devas ja havi iajn kialojn. Mi pensas, ke grava ero en la certe tre kompleksa kialaro, estas, ke la homoj simple ne trovas inde resti. Eble la kvalito de la Esperanta movado ne estas sufiĉe alta.

Kelkaj opinias, ke plej grava el ĉiuj niaj agadoj estas la kursoj por komencantoj. Ankaŭ mi opinias ilin gravaj, sed ĉu vere indas ekinstrui Esperanton al amasoj da novaj homoj, se nur tre malmultaj el ili ellernos la lingvon? Ĉu ne estas pli grave zorgi pri la jamaj esperantistoj? Ĉu ni ne donu al ili bonajn kialojn resti? Ili bezonas lernolibrojn por daŭrigi post la komenca kurso, pli bonan literaturon, pli interesajn gazetojn, pli allogajn esperantajn organizojn, ktp. Eble ni eĉ devas zorgi, ke la lingvo mem fariĝu pli lerninda. Hodiaŭ multaj

trovas la mankegon de teknikaj kaj ankaŭ ĉiutagaj vortoj tro granda.

Ĉiujare multaj homoj eklernas Esperanton tute mem, sen influo de nia propagando. Temas pri homoj, kiuj interesiĝas pri lingvoj ĝenerale, pri homoj idealismaj, pri tiaj, kiuj trovas la lingvon "hazarde". Temas pri aŭtomata alfluo de homoj al la Internacia. Se ni nur sukcesus reteni iom pli ol 5% el tiuj, nia movado komencus kreski sen ia propagando entute. Kaj tia kresko en si mem konsistigus altigon de la utilo kaj kvalito de nia movado. Ju pli multaj ni fariĝos, des pli interesa iĝos la lingvo, kaj des pli granda fariĝos tiu aŭtomata alfluo de interesitoj. Jen la vojo laŭ mi pli provinda ol elpensado de novaj argumentoj.

Efektive mi opinias, ke la agado de nia movado devas draste ŝanĝiĝi. Ni ĉesu ĉiam pensi pri kiel varbi pli da homoj. Ni anstataŭe pensu pri la jamaj esperantistoj, pri ni mem. La plej bona, kion povas fari unuopa movadano, estas pliboni-





gi sian propran lingvoscion, ĉar ju pli da homoj vere parolas Esperanton bone, des pli utila fariĝas la lingvo. Anstataŭ "malŝpari" sian tempon pri propagando, oni ellernu la lingvon, kaj uzadu ĝin. Nur oneto el la esperantistoj entute okupiĝu pri propagando. La plej multaj devus esti "simplaj" uzantoj.

Temas ankaŭ pri mono. La movado estas malriĉa. Ni do devas uzi nian monon tie, kie ĝi plej efikas. Ni ne uzu ĝin por hanti parlamentaĵojn kaj aliajn, kiuj simple ne interesiĝas. Ni ne presu ankoraŭ unu broŝuron kun argumentoj, kiuj konvinkas neniun. Ni ne aĉetu multekostajn anoncojn en la gazetoj. Ni ne kampanju senrezulte. Ni ne rezoluciu vane. Anstataŭe ni uzu nian monon por produkti pli bonajn lernolibrojn, pli bonajn vortarojn, pli altkvalitajn kongresojn ktp. Ni eble eĉ provu (laŭ petoj de triamondanoj) krei teknikan kaj sciencan literaturon en Esperanto (ne por ŝovi sub la nazon de parlamentanoj, sed por uzi!). Kaj ni flegu kaj evoluigu la propre esperantan kulturon. Ni simple altigu la internan kvaliton de nia movado!

Kompreneble ni ne ĉesu tute pri informado, sed kiam ni informas, ni faru tion altkvalite kaj precipe honeste. Tralegu kelkajn informi-

lojn pri Esperanto kun malfermitaj okuloj. Ĉu ne troviĝas en ili amaso da troigoj kaj eĉ mensogoj? La plej klara mensogo estas tiu pri nur dek ses reguloj. (Kiom da reguloj enha-

vis via lernolibro?) Se oni misprezantas Esperanton, oni ne surpriziĝu, kiam la homoj poste forlasos la lingvon konstatinte, ke la propagando mensogis.

La personojn, kiuj havas negativajn antaŭjuĝojn pri Esperanto, ni lasu en paco. Ili verŝajne ĉiuokaze ne konvinkiĝos. Tro fervoraj varboklopedoj nur aspektigas nin, kiel religiajn fanatikulojn. Ni uzu la lingvon kaj rakontu pri ĝi al tiuj, kiuj montras intereson. Esperanton oni lernu, ĉar oni trovas ĝin utila, ne por fariĝi propagandisto.

Mi kredas, ke la revo de la esperantistoj povas realiĝi, sed bezonatas alispeca agado por ke tio okazu. Ni lasu la vojon de argumentado kaj ekpaŝu sur la vojo de kvalitaltigo. Ni faru Esperanton lerninda!

Se vi havas proponojn, kiel konkretigi miajn ideojn, skribu al La Espero. Se vi malkonsentas kun mi, vi ankaŭ skribu. Debato necesas!

Bertilo Wennergren

PLEJ BONA KRISTNASKA DONACO

ORM LA RUĜA

de Frans G. Bengtsson, tradukita de Bertil Nilsson

Tute freŝa el la presejo!

Mendu por vi mem kaj viaj eksterlandaj amikoj ĉi tiun klasikan romanon pri la vikinga epoko.

La bele bindita libro kostas nur 135 kr, inkl. varimposto kaj sendkosto.

Kaj se Eldona sendas ĝin eksterlanden, vi bezonas pagi nur 120 kr.

Eldona Societo Esperanto
Box 7520, 200 42 Malmö, poŝtĝiro 578-5

"Bubalo" aŭ "bizono" – eraro de l' monato

Plurfoje oni rimarkis ekzemplojn de malĝusta lingvouzo en esperantaj periodaĵoj, sed ŝajne ĝis nun ne estis faritaj specifaj proponoj por regule kaj sisteme informi legantojn pri la plej gravaj el tiuj eraroj. La minimuma tasko de respondeca redakcio estas atentigi abonantojn kaj legantojn pri misaĵoj en antaŭaj numeroj de la periodaĵo. Tion devas fari ĉiuj, kiuj uzas revuojn kaj gazetojn por instrua celo en Esperantokurso, por ke komencantoj ne legu erarhavajn tekstojn. Mi, do, proponas al redakcioj la enkondukon de nova rubriko titolita "Eraroj de l' monato", kies celo estas pritrakti la

plej gravajn misaĵojn aperintajn en antaŭe publikigitaj numeroj. Ne nur legantoj sed ankaŭ kunlaborantaj aŭtoroj kaj la redakcianoj mem certe profitos de la didaktika enhavo de la nova rubriko.

La ideo pri la rubriko "Eraro de l' monato" venas de la magazino *Monato*, en kiu estas pluraj regule aperantaj rubrikoj kiel "Raportoj de l' monato", "Opinio de l' monato", "Kuirrecepto de l' monato" ks. Tamen, mankas la tre bezonata "Eraro de l' monato". En tiu ĉi artikolo mi ilustras la utilon de la proponata rubriko, ne per listigo de ĉiuj eraroj en unu numero de

periodaĵo, sed per ekzemplo de misa vortouzo, trovebla ankaŭ en aliaj publikigaĵoj. Jen la citaĵoj:

1. "Ĉu vi konas Bubalon Vilĉjon, la terorulon de l' sovaĝa okcidento? – Buffalo Bill, de held..." (KEG, 5/1986 majo, pĝ. 53, kol. 3)

Teo Jung konis la saman ulon. En sia aŭtobiografio *Ĉiu-Ĉiun*, li rakontas, kiel lia ŝatata eksterlerneja okupo estis legi librojn pri la sovaĝa okcidento de Nordameriko:

2. "...mi preterpasis unu butikon, kie oni elmontris kaj vendis kaje-rojn i.a. pri Buffalo Bill, la usona "kolonelo", "bubalo- kaj indianmortigisto" kaj posta cirkoposedanto Bill Cody." (pĝ. 35)

En artikolo titolita "Mirlando de l' naturo – la Yellowstone-parko en Usono" de Rikardo Rance (*Monato*, 6/1986, pĝ. 16–19), dufoje aperas la bestnomo "bubalo":

3. a) "Tuj el la plej ekscitaj momentoj okazas, kiam oni neatendinte renkontas urson, familion de alkoj aŭ aron da plurcent bubaloj sur vojeto." (pĝ. 18)

b) "bubalo (Bison bison)." (pĝ. 17)

Rakonto titolita "La ofero de la pipo" de la amerika indiano Nigra Elko (?) estis elgermanigita de la Traduka Servo de Asocio de Verduloj Esperantistoj (AVE) kaj publikigita en *Antaŭ la nova jarmilo – ideoj por la vivo en mondo minacata*. La bestnomo "bubalo" aperas en jenaj kunteksto:

4. a) "Antaŭ tre longa tempo ili diras, du skoltoj serĉis pri bubaloj..." (pĝ. 23)

b) "Tio estis pipo; sur unu flanko de ĝi estis enfosita bubalido..." (pĝ. 23)

Havanna 1990

Nu ĝar det bra att anmäla sig till den internationella esperantokongressen i Havanna 14-21 juli 1990. Om du anmäler dig före 31 december får du den lägsta kongressavgiften.

Kongressavgiften i svenska kronor

	Till 31/12 1989	Till 31/3 1990	Fr o m 1/4 1990
1 Direkt medlem i UEA	575	720	865
2 Icke direkt medlem i UEA	720	865	1000
3 Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som är direkta medlemmar i UEA	290	430	575
4 Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som inte är direkta medlemmar i UEA	430	575	720

Beställ anmälningsblankett hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-501 52. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5 Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

c) "...kiam la homo postrigardis sin, dum ŝi foriris, estis subite blanka bubalo, kiu forkuris..." (pĝ. 24)

En ĉiuj frazoj la uzo de la vorto "bubalo" estas erara. La kunteksto evidente temas pri la amerika bizono. Bubaloj ne estas indiĝenaj en la Nova Mondo, do ili estas troveblaj nur en zoologiaj parkoj. Eĉ Plena Ilustrita Vortaro informas ĝuste, ke la bubalo estas speco de bovo el Azio. Car la verkinto de la citita artikolo en Monato menciis, ke la latina taksonomia nomo de la besto, kiu troviĝas en la parko Yellowstone, estas **Bison bison**, tute ne pravigbla estas lia uzo de la nomo "bubalo".

La fonto de tiu ĉi eraro estas la angla vorto **buffalo**, kiu en la ĉiutaga lingvo estas uzata kiel sinonimo de **bison**. Tamen, en Esperanto tute ne estas eble uzi "bubalo" sammaniere. En la angla lingvo oni nomas la azian bovon **water buffalo** (*Bubalus bubalis*) por diferencigi ĝin de la indiĝena besto de la nordamerika kontinento, nomata **buffalo**, kiu pli ĝuste estas **bison**.

En la sovaĝa stato, bubaloj estas treege danĝeraj bestoj, sed en Hindio kaj la Fora Oriento, la homo sukcesis domestiki¹ ilin. Estas sciinde, ke en Ameriko nek la indianoj nek la eŭropdevenaj setlantoj² trovis manieron domestiki la bizonon, kaj la gregoj estis preskaŭ ekstermitaj pro troa ĉasado.

Bernard Golden

Glosoj:

¹ **domestiki** (tr.) – adapti sovaĝbeston aŭ sovaĝkreskaĵon al vivo en intima asocio kun la homo kaj avantaĝe al li.

² **setli** (ntr.) – eklogi, loĝigi aŭ fondi kolonion en nova ĉirkaŭaĵo, regiono aŭ lando.

Tri, kies mankon ni jam sentas

Edla Nilsson

La 21an de aŭgusto 1989 mortis Edla Nilsson en Malmberget. Edla estis mirinda homo. Ankoraŭ dum siaj okdekkelkaj jaroj ŝi fervore laboris por esperanto kaj partoprenis universalajn kongresojn kun neestingita ardo.

Multaj inter ni memoras ŝian ĉiaman ĝojon kaj interesiĝon. Ŝian personecon bone priskribas la jena anekdoto, kiun mi aŭdis: Antaŭ la UK en Vancouver, Kanado, Edla partoprenis rondvojaĝon en la lando. En unu hotelo montriĝis, ke nur restas ĉambroj kun akvolutoj. La gvidanto iom timis ke la okdekunujara svedino, ne ŝatus dormi en tia lito. Kiam Edla eksciis pri la afero ŝi tamen ĝojkriis: "Ho, mi dum tiom da tempo emis provi tian liton. Kia ĝojo, ke nun eblas." En la ĉambro ŝi tuj ĵetis sin sur la liton. Ŝia ridado fariĝis eĉ pli laŭta kiam montriĝis ke ŝi ne sukcesas ellitiĝi sen helpo. Tia varmkora homo estis Edla. Ne mirigas min, ke ŝi testamentis monon al SEF.

Leif Nordenstorm

Margit Hansander

En julio 1989 forpasis Margit Hansander. Margit estis malavara malnova aninio de nia Esperanto-societo de Uppsala. Ni vere sentas la pardonon de ŝi.

Eugen Rytenberg

Carl Erik Carlsson

La 21an de septembro mortis Carl Erik Carlsson en Stora Levene. Li estis mia amika ekde 1958. Eĉ en la du hospitaloj, en kiuj li trapasis la lastan monaton de sia vivo, li neniam perdis okazon paroli pri Esperanto kun siaj flegistinoj.

Paulette Pêche

Malaperis post kvardek jaroj da amikaj interrilatoj bonega esperantisto, kies kulturon kaj bonhumoron, kaj dum tiuj lastaj jaroj kuraĝon kaj serenecon, mi admiris. La multaj francaj geamikoj de Carl Erik fidele kaj danke memoros pri li.

Maurice Sujet

Julklapp för gammal och ung

Kumeuaua, djungelns son

Skriven på esperanto av Tibor Sekelj, översatt till svenska. 68 sidor. Två sidor information om esperanto. Många bilder.

Pris: 52 kr. Beställ från EsperantoCentro, Esperantoförlaget eller direkt från Nordenstorms förlag, Munkebergsgatan 38, 3 tr, 951 56 Luleå, tel 0920-279 78, postgiro 57 20 82-6.

Unu sveda informkajero kaj fasko da ĉinaj libroj

38 svar till den som undrar om esperanto

Claude Piron, Esperantoförbundet, 1989, 32 s, 15 kr

"Vilken snygg bok!" sade min fru när hon fick se "38 svar till den som undrar om esperanto", ligga på mitt skrivbord. Jag håller med. "38 svar" är tilltalande till det yttre och användbar både för oss esperantister för att rusta oss i esperantoinformationen, och för att sätta i händerna på dem som vill veta mer. I boken finns svar på sådana frågor som intresserade ofta ställer: "Är inte esperanto alltför mycket ett europeiskt språk?", "Varför går det så långsamt för esperanto att bli accepterat?"

Leif Nordenstorm

Infanaj kaj pribestaj libroj el Ĉinio

Jen tri libroj el Ĉinio por sufiĉe malgrandaj infanoj, de du ĝis dek jaroj. Ili estas ĉiuj tre ĉarme desegnitaj kaj havas iun mesaĝon iom moralan, kio laŭ mi estas sufiĉe tipe por ĉinaj infanlibroj.

Bestidoj kaj iliaj patrinaj

Gjang Jiming, Cina Esperanto-Eldonejo, 18 p

Ci tiu libro estas tre taŭga por malgrandaj infanoj. Ĝi montras kelkajn tipajn bestinojn kun siaj idoj, kiel ili zorgas siajn infanojn. Oni ekzemple renkontas la katon, la pingvenon kaj la kanguruon. Vi

ankaŭ havas la eblecon lerni la nomojn en esperanto de kelkaj bestoj, kiuj ne estas same kutimaj, ekz ĉu vi scias kio estas maniso aŭ bradipo? Legu la libron kaj vi ekscios!

bp

Malgranda rano flugis kaj falis

Tradicia rakonto, Cina Esperanto-Eldonejo, 18 p

La mesaĝo de tiu libro estas ke vi povas perdi amikojn pro via fiereco. La malgranda rano ĝuste tion faras. Oni montras tion tre litere. La rano volas flugi kun siaj amikoj, la du anseroj, kaj li mem trovas bonan manieron kiel kunflugi malgraŭ lia malflugkapableco. La du anseroj tenu bastoneton kaj la rano morde tenu ĝian mezon. Homoj rigardante tion tre laŭdas la anserojn pri ilia kapablo, sed la rano tre koleriĝas ĉar li opinias ke estis lia ideo. Finfine li devas protesti kaj li malfermas la buŝon kaj falas teren kaj neniam plu vidas siajn du amikojn.

bp

Grandaj pandoj - brilaj steloj

Geng Souong, Cina Esperanto-Eldonejo, 23 p

Vi konatiĝos kun la pando Uejuej. Li estas kaptita pando, kiun oni volas igi akrobaton, uzi en cirko kaj

en filmoj. Vi ekscos iom pri la pando, pri liaj kapablecoj kaj karaktero.

Bedaŭrinde la libro ne montras la malbonan flankon de la tenado de pando en mallibereco. En la libro ŝajnas ke la homoj faris tre bonan laboron kaj eĉ feliĉigis la pandon. Tamen mi pensas ke la rakonto estas bona kaj ĝi povus esti uzita kiel diskutmaterialo, kiam oni volas paroli kun infanoj pri la traktado de pandoj aŭ bestoj ĝenerale.

Berit Posthuma

Aventuro de ĉasisteto dum ekspediciado

Cen Sjaŭji, Cina Esperanto-Eldonejo, 81 p

Ĉu vi volas scii kion fari kiam vi estas atakita de hommortigaj vespoj? Legu 'Aventuro de ĉasisteto dum ekspediciado'. Ĝi estas ekscita ĝejunula rakonto pri ĉina esplorista ekspedicio, kiu vojaĝas al Latinameriko por studi la bestan vivon tie. La rakontanto estas knabo, kiu pro iu ne klarigita kaŭzo partoprenas la ekspedicion. Dum la esplorado okazas pluraj neatenditaj renkontoj kun danĝeraj bestoj. Temas pri i.a. jaguaroj, krokodiloj, piranjoj (hommanĝa fiŝo), vampiroj kaj formikoj. La rakonto vere estas ŝtopita de bestonomoj, kelkaj ankaŭ en la latina. Pri la plejmulto mi neniam aŭdis kaj tial mi bezonis kaj PIV kaj svedlingvan faŭnon por kompreni pri kio temas. Bona helpo estas la malgrandaj kaj bone faritaj desegnaĵoj.

Inter la riskoplenaj aventuroj la leganto ankaŭ estas instruata. Profestoro Geng donas pedagogiajn lecionetojn pri la bestoj kaj la naturo. Bedaŭrinde nenio estas menciita pri ekologiaj problemoj, kaj aliaj flankoj de la latinamerika socio tute ne estas traktataj.

Legante la libron mi ekpensis pri

La redakcio de La Espero

dankas ĉiujn helpantojn kaj kontribuantojn kaj deziras

Bonan Kristnaskon kaj Aktivajn Jaron 1990!
Viaj kontribuoj estas daŭre bonvenaj.

Kalendaro

alia ĉasisteto: Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo' de Tibor Sekelj. La rakontoj iom similas unu la alian sed Kumeŭaŭan mi fakte preferas ĉar ĝi estas pli ĉarme verkita kaj la lingva nivelo pli taŭgas por ne tro spertaj gejunuloj. Tamen 'Aventuro de ĉasisteto dum ekspediciado', estas rekomendinda al tiuj kiuj interesiĝas pri kuriozaj bestoj, kaj streĉa ĝi ja intertempe estas.

kl

Ĉinaj protektataj bestoj

Cen Sĵaŭji, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 345 P

La dua libro pri strangaj bestoj estas faklibro pri 'Ĉinaj protektataj bestoj' kies ĉefa redaktoro verkis la supre menciitan gejunulan rakonton. Vi ĉiuj ja konas pitonon, alkon, cignon, brunan urson kaj kompreneble grandan pandon. Sed ĉu vi ankaŭ volas scii ion pri hinda zibeto, porkovosta makako, elefanta fiŝo, Armstrong-tringo, Przewalski-gazelo kaj tigrostria rano? En la libro vi trovas ilin ĉiujn kaj pli ol 150 aliajn mamulojn, birdojn, fiŝojn kaj rampulojn detale priskribitaj kaj ilustritaj. La desegnaĵoj estas belaj kaj kvankam nur nigra-blankaj, tre informaj.

Laŭ mia tute ne faka prijugo la libro ŝajnas scienca kaj fidinda. Nur mankas al mi pli ĝenerala informo pri la ĉina bestovivo kaj la ŝtata protektado de ĝi. Eble la lasta entute ne estas priskribinda, ĉar antaŭ nelonge mi legis en sveda gazeto, ke nur ek de tiu ĉi jaro troviĝas ĉina leĝo kontraŭ ĉasado de bestoj minacataj de ekstermo. Kaj ankoraŭ troviĝas restoracioj en kiuj vi povas mendi urson, leopardon kaj pitonon! 'Ĉinaj protektataj bestoj' feliĉe ne estas gastronomia gvidlibro, sed en aliaj vidpunktoj tre leginda.

Kajsa Larsson

Kumeŭaŭa certe estas unu el la perloj de la esperanta literaturo. Mia sperto tamen estas ke ĝi ne taŭgas kiel legaĵo por komencantoj, ĉar la aŭtoro intence uzis nekorektajn formojn, por imiti la nekorektan hispanan lingvaĵon de Kumeŭaŭa. ndlr

januaro

8 jan - 9 mar **Kurso por komencantoj**, Karlskoga (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)

marto

12 mar - 11 maj **Daŭriga kurso**, Karlskoga (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)

aprilo

13 - 16 **Paska renkontiĝo**, Vierhouten (Nederlanda Esperanta Junularo, Lilian van der Burgt, Postbus 528, NL-6200 AM Maastricht, Nederlando)

13 - 20 **6a Printempa Semajno Internacia**, porfamilia aranĝo en Todtmoos, Sudokcidentgermanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde, FR Germanio).

majo

18 - 20 **Sveda esperantokongreso**, Karlskoga (Informoj venos en *La Espero*)

24 - 27 **3-a Kultura Esperanto-Festivalo**, Västerås (Informoj venos en *La Espero*)

25 - 30 **3-a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto**, Beijing, Ĉinio (Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio)

junio

4 - 10 **Esperanto-kurso por geskoltoj**, Kimito, Finnlando (Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 Kimito/Kemiö, Finnlando)

11 - 15 **5a Internacia kurso**, Nordiska folkhögskolan, Kungälv

15 - 16 **Bicikla konkurso "Vätternrundan"**, (Esperantista teamo: Anita Bergh, Hasselgatan 60, 194 37 Upplands Väsby, tel. 0760-85872)

julio

9 - 14 **Someraj kursoj**, Karlskoga (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)

14-21 **Universala Kongreso**, Havanna (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)

14 - 23 **23a Internacia Renkontiĝo Naturamika**, nybörjar- fortsättningskurser, turistarrangemang, Abaliget, Pécs (IREN, Departementa komitato de HEA, Hungara Esperanto-Asocio, Pécs, Pf. 2. H-7601 Ungern)

23 - 29 **Internacia Junulara Kongreso**, Kubo (informoj venos en *La Espero*)

23 - 29 **Kvinpinta Semajno**, Finnlando (informoj venos en *La Espero*)

ofte

Vojaĝoj en Ĉinio (Esperanto-Turisma Sekcio, Pekina Turisma Servo Tian'an, 8 Dong Zhi Men Nan Da Jie, 100027 Pekino, Ĉinio)

Diversnivelaĵoj kursoj: (Internacia Esperanto-Kursejo, BL-4744 Smoljan, p.k. 36)

Esperanto-centrum i Bialystok

Planerna på ett internationellt esperanto-centrum i Bialystok i östra Polen blir mer och mer konkreta. Nu har myndigheterna lovat att ett slott som tidigare tillhört Lubomirski-familjen skall få användas. San Marinos internationella vetenskapsakademi har bestämt sig för att förlägga en del av sina kurser till Bialystok.

Amnesty använder esperanto

Medborgarrättsorganisationen Amnesty International fortsätter att använda esperanto. Det hela började 1987 då en privatperson, som var både esperantist och amnesty-medlem, satte in en annons för Amnesty i Kontakto. Plötsligt började det strömma in brev till Amnestys huvudkontor i London. De flesta kom från länder som Amnesty

hade haft ytterst litet kontakt med, bl a: Sovjetunionen och Polen.

Organisationens huvudkontor bestämde sig därför för att genomföra 1988 års namninsamling för mänskliga rättigheter även på esperanto. Nu kom svar bl a från Kina. Tidigare hade kineser aldrig deltagit i någon av Amnestys namninsamlingskampanjer.

I Kontakto 1989:4 har Amnesty satt in en två sidors annons, och ryktet säger att några av medarbetarna i London håller på att lära sig esperanto, för att kunna svara på alla brev som kommer.

VIZITANTO

Nisikawa el Takatuki

Nisikawa signifas "okcidenta rivero", kaj tiel poezian familian nomon havas japano, kiu vizitis Svedion dum kelkaj tagoj en septembro. Lia persona nomo estas Toyozo, kaj li loĝas en urbo Takatuki.

Nisikawa estas emerita vendisto de medicinaj aparatoj, inter alie rentgenaj iloj. Li laboris per tio dum 35 jaroj, kaj tiam li multe vojaĝis kaj speciale ekŝatis Romon, kiun li vizitis plurfoje. Dum la vojaĝoj li ĉiam atentis lerni iom el la lingvo de la lando, kaj tiamaniere scias iom de la angla, germana, franca, itala, rusa kaj ĉina. Nur unu fojon pli frue li vizitis Svedion, nome antaŭ 24 jaroj, kiam li faris viziton al la Karolinska institutet dum kelkaj tagoj.

Jam en la jaro 1928 li tiom interesiĝis pri lingvoj, ke li eklernis Esperanton, kaj do li nun havas 60 jarojn da esperantista vivo. Kiel studento, li trovis esperantan grupon en la universitato, kaj ek de tiam li estas aktiva en la Esperantomovado. S-ro Nisikawa nun estas prezidanto de la loka Esperantosocieto de Takatuki.

Takatuki estas dorm-urbo kun 350.000 enloĝantoj en la proksimeco de Osaka. Multaj el la takatukiaj enloĝantoj faras ĉiutage la duonhoran vojaĝon per trajno al Osaka por labori.

La Esperantogrupo de Takatuki havas 60 membrojn, kaj kunvenas ĉiusemajne en ĉambro de la kultura domo. Oni studas, legas kaj parolas dum la kunvenoj. En la japana kultura semajno en novembro, la klubo aranĝas ekspozicion pri Esperanto. La plej multaj membroj estas junaj, kaj ili aktive partoprenas ankaŭ regionajn kaj tutlandajn kunvenojn.

La urbo Takatuki estas ĝemelurbo de la finna urbo Oulu. Kiam la Esperantoklubo de Oulu ekhavis la taskon aranĝi finnlondon aŭtunan semajnon, oni sendis leteron al la Esperantoklubo de la ĝemelurbo kun invito, sed sen espero, ke iu povos veni. Sed s-ro Nisikawa faris la longan vojaĝon por viziti Svedion kaj Finnlandon dum kelkaj tagoj.

Ulla Luin

Asocio por juristoj

Refondiĝis Internacia Asocio de Juristoj. Informojn oni povas ricevi de: Ian Jackson, C&C Law Office, 2nd Fl. Citic Bldg, 19 Jianguomenwai Dajie, CN-10004 Beijing, Ĉinio.

Iom pri la kongreso en Havano

La temo de la Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo, estos "Esperanto, evoluo, kultura diverseco". Dr-ino Jane Edwards, etnologo el Usono fariĝos reĝisoro de la temo. Kiel ordinare okazos ankaŭ esperantologia konferenco, sub gvido de D-ro Humphrey Tonkin, kaj Internacia Kongresa Universitato, kun multaj prelegoj konvenaj al la kongresa temo.

La temo de Tago de la lernejo estos "Naciaĵoj kaj internaciaĵoj en Esperanto-lernomaterialoj".

La kuba poŝto planas eldoni tutan specialan poŝtmarkan serion kaj aranĝi kongresan stampon. Oni ankaŭ eldonos porokazan moneiron.

Ĉu esperanta teamo en Vätternrundan?

La 15an - 16an de junio 1990 okazos la bicikla konkurso Vätternrundan, 300 kilometroj ĉirkaŭ la lago Vättern, kun starto kaj fino en Motala. Anita Bergh klopodas organizi unu aŭ plurajn grupojn da esperantistoj, kiuj kune partoprenos. Por pliaj informoj kontaktu:

Anita Bergh, Hasselgatan 60,
194 37 Upplands Väsby,
Tel. 0760-858 75.

Skolta agado

La 1an ĝis la 9a de aŭgusto 1990 okazos granda skolta tendaro Tervas en Finnlando. Ĝin partoprenos pli ol 10 000 geskoltoj el la tuta mondo. Inter ili partoprenos la plejmulto el la partoprenantoj de la skolta esperanto-kurso en junio kaj ankaŭ aliaj esperantlingvaj skoltoj en aparta esperanta tendartrupo. Informojn donas: Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 KEMIÖ, Finnlando.

Tervas estas bona ebleco krei kontaktojn inter la esperanto-movado kaj la skolta movado ankaŭ en Svedio. Se vi havas intereson pri la afero kontaktigu kun:

Kaisa Hansen,
Hammarbyvägen 56,
19436 Upplands Väsby.
Tel. 0760-88210.

Seminarium i Karlskoga

Tjugo deltagare samlades i början av oktober vid Karlskoga folkhögskola. Bertil Nilsson, Nyköping, hade i förväg sänt ut ett par utdrag ur svenska böcker, som deltagarna hade att översätta till esperanto.

Under sammankomsten genomgicks och kommenterades de olika förslagen till översättning. Trots att kunskapsnivån och vanan att översätta till svenska varierade mycket bland deltagarna, var genomgången mycket givande för samtliga närvarande.

Ulf Ribers

Kvindek partoprenis en Skövde

La klubo en Skövde, de post kelkaj jaroj estas kreinta bonan tradicion: semajnfinaj kursoj unufoje aŭtune kaj unufoje printempe. Iomete pli ol kvindek estis la nombro da partoprenantoj en la semajnfinaj kursoj en Skövde 7-9 oktobro 1989, en la niveloj novuloj, mezuloj kaj pli-altuloj. Ĉio estis senpaga, eĉ la manĝaĵo.

Tamen ni faris vere grandegan eraron. Ni konkursis kun aliaj semajnfinaj kursoj en Karlskoga kaj Hallsberg. La aranĝantoj de kursoj, devas pli bone kontakti unu la alian en la estonteco.

Gustav Stenholm

Gasto el Tallinn

La aŭtuna renkontiĝo Småland-Blekinge okazis la 2-an de oktobro en Växjö. Ĉi-foje trideko da personoj, ankaŭ komencantoj, aliĝis. Redaktoro Ahto Kaljusaar el Tallinn prelegis pri la nova situacio en sia hejmlando Estonio, do surbaze de la "malsilento" (ruse: *Glasnost*). Ahto raportis ekz. pri la lingva situacio de Estonio. Interese, ke li, nun 51-jara intelektulo, ek de la juneco krom la estona bone regas la rusan, kontentige ankaŭ la germa-

nan, iomete la finnan, sed neniom da la angla lingvo!

Kiel sperta jurnalistoj Ahto kunportis bonajn fotilojn. Sekve iom post iom raportoj pri la trisemajna vojaĝo enfluos en estonajn gazetojn, kompreneble ankaŭ en la esperantistan landan organon. Ni aŭskultu la senbildajn rakontojn enkadre de la semajnaj radielsendoj el Tallinn: Ĵaŭde je 22.25, dimanĉe je 10.20 per 290 kaj 50,6 m. Aŭskultu kaj alskribu! Tie oni klare kaj malrapide parolas!

Pola aktorino turneis

SEF aranĝis en aprilo 1989 teatran turneon por la pola aktorino Jadwiga Gibczynska, kiu prezentis 'Ĉu la nepoj nin benos?' en svedaj lernejoj. La spektaklo estas inspirita de germana verko de Gudrun Pausewang 'La lastaj infanoj de Oldrovalo', kaj traktas la vivon post atomeksplodo. La aĝo de la spektantoj variis inter 10 ĝis 25 jaroj. La aranĝo estis iom riska, ĉar Kerstin Rohdin devis sekvi la aktorinon agadon per samtempa tradukado, sed la eksperimento sukcesis. Kaj la lernantoj, kaj svedaj gazetoj estis kontentaj.

Karlskoga popola altlernejo

Karlskoga estos la loko por la kongreso de SEF 1990. La popolaltlernejo, tre konata pro la multaj esperanto-kursoj, invitis nin kongresi en sia lernejo venontan jaron. La lerneja stabo proponis prizorgi la administracion por la kongreso kaj ni kun danko kompreneble akceptas. Lars Forsman kompreneble estos kunordiganto tie. La kongreso okazos 18-20 de majo kan mi petas vin rezervi la tempon jam nun. En La Espero 1990:1 ni prezentos la kongreson, la lernejon, kaj la urbon.

Karin Lindquist

Esperantoförbundet
Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm

Sten SYENONIUS
Erikstorpsgratan 26 A
21754 MALMÖ

-2

SEJU

Sveda Esperantista Junulara
Unuiĝo
Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund

Novaj datoj de IJK

Sanĝiĝis la dato de Internacia Junulara Kongreso. Ĝi okazos en Playa Girón, 200 kilometrojn de Havano, 22-28 julio 1989. Oni disponas pri 110 ĉambroj en komfortaj kaj modernaj bangaloj kun klimatiziloj. Oni klopodos kunligi IJK kun postkongresaj aranĝoj tiuregione riĉigante ĝin per ekskursoj kaj aliaj allogaj eroj.

Sukcesa aranĝo en Östansjö

Dum la semajnfino 6-8 de oktobro, mi partoprenis ege sukcesan SEJU-aranĝon en Östansjö apud Hallsberg. Berit Posthuma, Kajsa Larsson kaj Camilla Persson sukcesis arigi ne malpli ol dudek infanojn (7-15 jaraĝaj) por studi esperanton kaj amuziĝi. Dum du tagoj ni fervore laboris: la plej junajn instruis Inga Johansson, la mezjunajn Berit kaj mi la plej grandajn. La grupo de de Inga sugestopedie lernis, ĉe Berit ili inter alie teatrigis esperantan kanton, kiun ili vespere prezentis al ĉiuj. Mia grupo tralaboris rusan amrakonton, tre malfacilan. La lecionoj tre bone funkciis kun multe da ridado kaj efika laboro.

La organizintoj ankaŭ ne forge-

sis la kromaktivecon. Dum la paŭzoj ni povis origamii, teksti kaj ludi. Posttagmeze ni kantis, ludis (ankaŭ ekstere), dancis kaj ĝoje amuziĝis. Nur malfrue ekaŭdiĝis la konketoj de niaj plej junaj, intermiksitaĵoj de mallaŭtaj ridadoj de la plej aĝaj.

Ege gravan rolon por la sukceso de tia aranĝo ludas la manĝo. Tion bone sciis Mona Pettersson, Tina Holmboe kaj Camilla, kiuj riĉe kaj ofte regalis nin per la plej bongustaj pladoj.

La tuto tiel plaĉis al ni ĉiuj, ke la gejunuloj kaj la plenkreskuloj decidis refari la samon venontaŭtune kun eble pli da partoprenantoj. Ankaŭ viaj infanoj estos bonvenaj.

Sven Jonsson

Kvinpinta Semajno

Kvinpinta semajno estas kunlabora projekto de junaj nordiaj esperantistoj, ĉefe por tiuj, kiuj ne povas iri al Internacia Junulara Kongreso en Kubo

Por infanoj kaj gejunuloj ĝis 18

La Kastora Klubo de Esperanto estas internacia klubo de Esperanto por infanoj kaj gejunuloj ĝis la aĝo de 18, kiuj scias aŭ lernas Esperanton. Ĝia ĉefa celo estas instigi ilin uzi la Internacian Lingvon Esperanto kaj laboro por la lingvo kaj ties idealoj. Samtempe la Klubo donas al la infanoj la senton de apartenado al nia movado. Ĝi estas helpa al la instruistoj, kiuj trovas en ĝia sistemo de gradoj instigon al plua interesa laboro. Aneco estas senpaga, sed aliĝanto devas lerni kaj parkere ripeti simplan promeson. De la unua grado de Kastoreto li/si povas promociiĝi al la grado de Bruna, Arĝenta kaj fine Ora Kastoro. La Klubo ankaŭ havas sian Korespondan Servon. La adreso de la klubo estas:

Kastora Klubo de Esperanto,
ul. Klonowa 18,
PL-00-591, Polio.

Bonan Kristnaskon kaj Prosperan Novan Jaron 1990

deziras al vi ĉiuj la estraro de Sveda Esperanto-Federacio.

Ni dankas pro bona kunlaboro dum 1989 kaj esperas ke ankaŭ dum 1990 ni kunlaboru por antaŭenigi esperanton.

Karin Lindquist, Märtha Andréasson, Ulla Luin, Börje Andersson, Kersin Rohdin, Bertil Andréasson, Haldo Vedin, Leif Nordensstorm kaj Per Aarne Fritzton.